**Kvalifikaj Ekzamenoj de Esperanto laŭ Japana Esperanto-Instituto (JEI)**

- Celo de la ekzameno por japanlingvanoj:
  JEI okazigas la ekzamenon de la lingvo Esperanto por ke lernantoj povu plialtigi sian lingvokapablon kaj ke ĝi akcelu la disvastigon de Esperanto en Japanujo.

- Testoj:
  1-a grado:
  - Skriba parto 90 minutoj: lingvokonaj kaj gramatikaj taskoj, skriba sinesprimo (eseo) en Esp.
  - Parola parto 10 minutoj: libera interparolado pri la temo memelektita el kelkaj montritaj

  2-a grado:
  - Skriba parto 90 minutoj: lingvokonaj kaj gramatikaj taskoj, skriba sinesprimo (eseo) en la japana
  - Parola parto 10 minutoj: libera interparolado pri la temo memelektita el kelkaj montritaj

  3-a grado:
  - Skriba parto 60 minutoj: lingvokonaj taskoj, traduktaskoj de simplaj artikoloj al kaj de Esp.
  - Parola parto 5 minutoj: sinprezento, simplaj demandoj/respondoj

  4-a grado:
  - Skriba parto 60 minutoj: lingvokonaj taskoj, simplaj frazfaradoj en Esp.
  - Parola parto 5 minutoj: simpla sinprezento, simplaj demandoj/respondoj

- Brajligitaj Testoj por blinduloj: demandaro estas la sama kiel ordinaraj testoj
  1-a kaj 2-a gradoj: skriba parto 150 minutoj
  3-a kaj 4-a gradoj: skriba parto 90 minutoj
  Pri la parola parto, tute same kiel la ordinaraj testoj

- Kotizoj:
  1-a grado 6000 JPY, 2-a grado 4500 JPY, 3-a grado 3000 JPY, 4-a grado 1500 JPY

- Okazigo de la ekzamenoj:
  1. En Japana Esperanto-Kongreso: ĉiuj gradoj (inkluzive de brajligitaj testoj)
  2. Fine de marto ĉe JEI (Tokio): 2-a, 3-a, 4-a gradoj
  3. Iam ajn laŭpete, diversokaze kaj diversloke: 3-a, 4-a gradoj (malofte 2-a grado)

- Ekzamenkomisiono de Japana Esperanto-Instituto
  Retadreso: esperanto@jei.or.jp
  Retejo pri la ekzameno (japanlingve): https://www.jei.or.jp/gakuryokukentei/